



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 186

Oktobro 2001

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5



Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



SEPTEMBRA SUKCESO ĈE LIBRO-FOIRO

Dimanĉon la 30an de septembro en Halifakso, esperantistoj partoprenis por la dua fojo sukcesoplenan librofoiron titolitan „Vorto sur la Strato”. Centoj, eĉ miloj da homoj ĉeestis la apud-havenan lokon por renkonti verkistojn (ekz. Frank McCourt), aŭskulti legadojn, aĉeti librojn novajn kaj brokantajn, kaj viziti la tablojn de divers-temaj grupoj kiel la nia. Ankoraŭ estis homoj, kiuj sciis nenion pri la internacia lingvo. Sed estis multaj aliaj, kiuj jam iomete sciis pri Esperanto, eĉ se ili nur lernis pri ĝi kiam ili vizitis nian tablon antaŭ jaro. Multe helpis Dominique Marcon, vizitantino el Germanio, kiu montris al multaj sian nomon kaj adreson en la libreto de „Pasporta Servo”. Ŝi invitis multajn halifaksanojn viziti ŝin en Germanio, kompreneble post kiam ili almenaŭ iom scipovas la lingvon. Ni parolis kun multaj preterpasantoj kaj montris al ili ekzemplerojn de libroj, gazetoj, bildkartoj, leteroj, presitaj retpaĝoj kaj bildoj. Ni ankaŭ fordonis multajn broŝurojn kaj ekzemplerojn de la unua leciono de la senpaga perpoŝta kurso. Je la fino ni povis nur esperi, ke ni ricevos rezultojn de nia informa semado, sed Kim Keeble jam ricevis ekzemplerojn de la unua leciono de du interesitoj. Tio ja estas sukceso!



LETERO EL PRAGO

Jen la plejparto de tre afabla letero ricevita aŭguston de pragano Josef Kavka, geologo kaj naturhistoriisto interesita pri nomenklaturado, ties etimologio, kaj semantiko. D-ro Kavka, ĝenerala sekretario de la Internacia Scienca Asocio Esperantista, jam verkis artikolojn dum multaj jaroj pri la apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko.

Prago, 20.7.2001

Kara kolego,

Ĝue mi legis la numerojn de via gazeto, kiujn estis al mi pruntedonitaj de samideano Eli Urbanová. Mi bonvenigas interalie la fakton, ke la numero 169 (Majo 2000) estis plene dediĉita al la brila popularscienc-artikolo („Riboj”), plume de s-ano Stevens Norvell. Bonvolu transdoni al li mian plej sinceran gratulon pro la perfekta ekspliko de la malfacila temo (red: pri DNA kaj RNA). Bonega ankaŭ estas lia lingvaĵo. Eble interesos lin mia starpunkto al S kaj Z el la greka kaj latina. Se tia estis fontlingve intervokala, Zamenhof konsekvence redonis ĝin per Z: Ezopo, paradizo... Male, Zamenhof konsekvence lasadis S, se ĝi fontlingve ne estis intervokala: kongreso (congressus), proceso (processus), ktp. Bedaŭre, en „Riboj” mi trovis (la vorton) ‚procezo’.

Eble vi juĝos publikigenda mian artikolon (red: kiu sekvas) el mia propra fako, ĝis nun ne prezentita en Inter Ni.

Dezirante al vi plenan sukceson, mi restas amike via

J.Kavka

Redaktora noto:

En sia artikolo „Proceso” (STARTO, Prago, 1990/6), s-ano Kavka deklaras: „La vorto ‚procezo’ estas malbonŝanca, ĉar ĝi spitas kaj la skribmanieron, kaj la prononcmankon, ĉu de la fontlingvo, ĉu de multaj lingvoj modernaj... Zamenhof neniam transformis SS de fontlingvo al Z de Esperanto!... Kia bonŝanco, ke neniu imitis (red: per aliaj similaj vortoj) ĉi tiun fonetikan monstron!... Ja el PIV, la ‚procezo’ disvastiĝis en ĉiujn eblajn vortarojn, ĉar la esperantistoj kutime konsideras la sendube valoran verkegon kiel netuŝendan kaj netuŝeblan...

„Kion do rekomendas mi? Vaste apliki la vorton proceso ankaŭ en la PIV-a signifo 2 kaj laŭeble eviti la fonetike kriplan formon ‚procezo’, per kiu incitiĝas oreloj.”

Mi devas konfesi ke, kiel redaktoro, mi fidis al PIV kaj konsilis la uzon de ‚procezo’ por signifo malsimila al la unua signifo de ‚proceso’, kiu estas ‚juĝafero, jure submetita al tribunalo”. Tiun duan signifon de ‚proceso’ PIV egalas al ‚procezo’ kaj, sen la sperto kaj lerteco pri etimologio de D-ro Kavka, mi konsideris la duan signifon sufiĉe aparta por meriti malsaman literumadon. Eĉ nun mi ne trovas la vorton ‚procezo’ tiom incitanta. Kion opinias vi?

SCIENCAJ MINERAL-NOMOJ EN ESPERANTO

far Josef Kavka

Se leviĝas demando, ĉu Esperanto akceptu internacie kodigitan nomon de mineralo, la jesa respondo estas memkomprenebla. Bedaŭre, ne raras okazoj, ke la scienca nomo estas nepardoneble misformita, do aplikebla maksimume nur kiel laika, popola, komunuza, beletra k.s.

Tiaspecajn - el la mineralogia vidpunkto - misnomojn prezentas ankaŭ la ĵus reviziata PIV. Jen almenaŭ deko da ekzemploj:

1. **Aŭripigmento**: Bone. Sed tiu ĉi kapvorto referencas al la nomtradukaĵo ‚orpigmento‘, kiun akompanas la difino koncernanta la antaŭe menciitan mineral-nomon. Jen procedo tute mala: Se la nova PIV emas persisti pri registrado de la tradukaĵo, ĝi referencu al la kodigita aŭripigmento, akompanata de la scienca difino. Ja tiel estas en al nuna PIV.
2. **Ceruzito**: Bone, sed laŭ PIV „scienca nomo de ceruzo”. Ree male: la difino estu ĉe ceruzito, ne ĉe la misforma „ceruzo”.
3. **Cinabarito** estas la ĝusta nomo de la mineralo; tamen, ĝi mankas en PIV, dum ĝia difino troviĝas ĉe „cinabro”, kiu ne estas internacie kodigita nomo de la mineralo, sed termino ĥemia-teĥnologia, difinita kiel tia en la nuna PIV kaj registrita kiel la fundamento.
4. **Galenito** mankas en la nuna kaj same en la reviziata PIV. „Galeno”, kvankam fundamenta, apenaŭ povas servi eĉ sole por uzo laika. Temas pri neinternacia francismo: galenit (ĉeĥa, pola, rusa), Galenit (germana), galenite (angla), galène (franca).
5. **Granato** ricevis sian nomon laŭ la ruĝa frukto de la mediteranea arbedo *Punica granatum*: granat (ĉeĥa), Granat (germana), granate (Es), granat (pola, rusa). PIV, por eviti la plurnociecon de la vorto, rifuĝis al la „grenato” (neoficiala francismo) kaj tiel perdis la elvokivan etimologian koherecon kun la frukto. Eĉ pli: ĉu la petrologoj nun rebaptu la metamorfan rokaĵon (granatito), konsistantan ĉefe el granato? Ĉu la kristalografoj rezignu pri la termino granatformo por la rombodudekedro?
6. **Hiacinto**, ne „jacinto”!
7. **Ĵadeito**, ne „ĵado”. Ja ekzistas la metamorfaĵo ĵadeitito, konsistanta ĉefe el ĵadeito.
8. **Olivino**, ne „oliveno”. La magmorokaĵo: olivinito. Aliflanke, olivenito estas mineralo tute alia ol olivino.
9. **Rubino**, ne „rubeno”, kvankam fundamenta. Cetere, la medicinistoj povas rakonti pri „bilirubino”, „bilirubinemo”, „bilirubinurio”. La misformado de -IN- per -EN- estas tute senbaza faro. T.A. Hoeg (1988) registris 24 mineral-nomojn kun -IN-, kiujn ne eblas rebapti. Plurajn el ili registras ankaŭ PIV, ekz. „turmalino”.
10. **Serpentino**, ne „serpenteno”.

Nia limigita spaco ne permesas elnombri ĉiujn mineralnomajn misojn. Se ili tamen persistos en la nova PIV, la mineralogoj malfide konsideros Esperanton...